



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 47/77 - 5 dec 1977
Aperas ĉiusemajne

Pilo-Press

Jara abono

30,-- GM

Abonu nun por
1978

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Okaze de la 7-a de decembro 1977

La 7-an de decembro 1977 estos la sepa datreveno de la subskribo de traktado pri la normaligo de la rilatoj inter Pollando kaj Federacia Respubliko Germanujo. Certe ne ĉiuj esperoj plenumiĝis, sed ambaŭ flankoj serioze klopodas atingi la normaligon en la rilatoj. Kaj oni povas diri, ke la rilatoj inter Pollando kaj Federacia Respubliko Germanujo estas same gravaj kaj esencaj por la kunvivado en Eŭropo kiel tiuj de Francujo kaj Federacia Respubliko Germanujo.

Tio ankaŭ klare esprimiĝis en la vizito de federacia kanceliero Helmut Schmidt en Pollando en la tagoj de la 21-a ĝis la 25-a de novembro kaj la ampleksa raportado de ĝi fare de la amasmedioj, inkluzive de la Esperanto-redakcio de la Pola Radio, en kies raportoj kaj komentarioj ni povis sekvi la viziton.

El la ampleksaj raportoj kaj komunikoj ni volas publikigi la Esperanto-tradukon de la parolado de federacia kanceliero Helmut Schmidt, farita la 23-an de novembro en Auschwitz-Birkenau. La parolado tekstas jene:

" Verdire ĉi tiu loko ordonas silenti. Sed mi estas certa, ke la germana federacia kanceliero ĉi tie ne rajtas silenti.

Ni venis al Auschwitz por memori nin kaj aliajn pri tio, ke sen ekonomo de la pasinteco neniu vojo estos en la estonteco, ankaŭ neniu vojo al novaj kaj senpartiaj rilatoj inter germanoj kaj poloj. En Auschwitz kaj Birkenau neniu povus eviti la ekkonon, ke politiko estas io alia, ke politiko estas pli ol ludo inter fortoj kaj interesoj, ke politiko bezonas la moralan bazon kaj la etikan orientiĝon.

En ĉi tiu loko fariĝas ne refuteble klare, ke historio ne nur povas esti komprenata kiel kaŭza ĉeno de eventoj kaj agoj, sed ke al tio apartenas respondeco kaj kulpo, ke respondeco kaj kulpo ankaŭ estas historiaj grandoj.

La krimoj de la nacifaŝismo, la kulpo de la germana regno sub gvido de Hitler pruvas nian respondecon. Ni hodiaŭaj germanoj ne estas kulpaj kiel personoj, sed ni devas porti la politikan heredon de la kulpuloj; ĉi tie kuŝas nia respondeco. El ĝi kreskas la mandato ne lasi la estontecon al la hazardo, sed formi ĝin kun kuraĝo, kun antaŭzorgo.

Ne bezonas juna germano sin senti mallibera, se li renkontas polan samaĝulon. Sed li devas scii, kion tiam germanoj faris en la germana nomo. Scii li devas, kion eksciis lia pola samaĝulo de siaj gepatroj kaj geavoj pri Auschwitz kaj kion li eksciis pri la germana okupacio post 1939. Scii li fine devas, ke direktas sin al li kiel junan germanon specialaj postuloj.

Estas postuloj, al kiuj ankaŭ la registaro de Federacia Respubliko Germanujo estas konfrontata, postuloj, kiujn ĝi agnoskas kaj klopodas ĝin plenumi, depost Konrad Adenauer kun niaj okcidentaj najbaroj kaj depost Willy Brandt kun niaj orientaj najbaroj komencis konscie serĉi la interkompreniĝon.

Ni scias, ke ni ne povas fari ion ne okazinta, sed ni povas tiri la konsekvencojn por la estonteco. Ni faras tion depost 32 jaroj, ni faras tion rigarde al ĉiuj viktimoj de la nacifaŝismo en ĉiuj landoj de Eŭropo, ankaŭ en nia propra lando. Kaj mi pensas, ke niaj polaj partneroj,

Okaze de la 7-a de decembro 1977 (daŭrigo)

Ĝuste ĉar ili devis suferi plej multe, komprenos plej bone, se mi memorigos pri tio, ke la unuaj viktimoj de Hitler estis germanoj kaj ke ĝis la fino de Hitler en pli grandiganta nombro ankaŭ germanoj fariĝis la viktimoj de sia didakturo.

Kaj la poloj komprenos, se mi memorigos pri tio, ke en nia propra lando estis farita kontraŭstaro de germanoj, kiuj ĉiam denove, kvankam ankaŭ en tragika vaneco, provis meti finon al la sangoplena tiraneco super Eŭropo.

Ĉi tiuj germanaj batalantoj kontraŭ Hitler, virinoj kaj viroj el ĉiuj politikaj tendaroj, ankaŭ apartenas al la germana pasinteco, kaj ili estas ilia respektinda parto. Kaj ili estas por ni germanoj kaŭzo por modesta fiero, sed antaŭ ĉio por la devigo, pri kiu mi ĵus parolis, por la devigo tiri konsekvencojn por la estonteco.

Auschwitz estas admona monumento. Sed ne estas la rajto de ni germanoj por diri ke ĝi estas admona monumento, kiu admonas al interpaciĝo. Ĉi tion povus diri nur tiuj, kies kuncivitanoj ĉi tie suferis. Sed ni scias unu, ke Auschwitz ne povas elkrampi la vojon al interpaciĝo, kaj ni scias, ke la vojoj al interkompreniĝo ĉi tie en Auschwitz ne rajtas finiĝi."

Zamenhoffesto en Schwelm

Schwelm/Köln (pp/hlz) - La 3-an de decembro 1977 okazis en Schwelm la tre bone organizita Zamenhoffesto sub partopreno de 70 esperantistoj el fervojaj distriktoj Köln, Essen kaj Hannover, inter ili la GEFA-sekretario kaj la redaktoro. Ankaŭ ĉeestis geamikoj el Belgio.

Post komuna kanto salutis la grupestro de Schwelm, s-ro Kronshage, kaj kolego Herlitze kiel fervoja distriktkomisiito de Köln la gastojn kaj partoprenantojn.

La belga amiko, s-ro Torben Kehlet, montris lumbildojn pri la famekonata "Bona Espero" en Brazilo. La diapozitivaj vekis ne nur grandan intereson, sed ankaŭ instigis la partoprenantojn aĉeti multajn lotojn de abunda kaj valorriĉa loterio, kies enspezoj en alteco de 500 GM estis disponataj por la kresko kaj prospero de "Bona Espero" kaj ties infanoj. La resto de enspezoj estas disponata por la kreskado de la Esperantomovado en Malagasio.

La feston ankaŭ vizitis la urbestro de Schwelm, s-ro Rainer Döring. Sinjoro Kronshage dankis la urbestron pro la helpo al la Esperanto-grupo Schwelm kaj memoris lin pri la deziro nomigi iun straton kiel Esperanto-vojon. La urbestro promesis tion, menciis la tre gravan celon kaj idealon de nia komuna lingvo por pli bona kompreniĝo inter ĉiuj homoj en la mondo. Li deziris al la laboro de la esperantistoj sukceson.

Kolego Schindler montris tre interesan filmon pri la lasta UEA-kongreso en Islando.

Post komuna vespermanĝo oni disdonis em gaja humoro la premiojn de la lotumado. La festo finiĝis post dancado, babilado kaj preparita kvizo.

Dankon al la grupestro Kronshage, al gekolegoj Schindler kaj Lohse kaj al ĉiuj, kiuj kunhelpis en la sukcesa aranĝo kaj donacis valorajn objektojn por la lotumado.

Nia membro, s-ino Köhler, raportis pri nia kunveno al la ĵurnalo de Schwelm, kiu publikigis du ilustritajn artikolojn.

Ĉefkunveno de ROMOLO

Frankfurt/M (pp-geri) - ROMOLO, la Rhein-Main-Ligo esperantista, havis sian ĉefkunvenon en Frankfurto la 27-an de novembro 1977 kun preskaŭ 30 partoprenintoj. Demisiis la prezidanto, Robert Kvasnak, Offenbach.

Elektiĝis por du jaroj Gernot Ritterspach, prezidanto; Gerd Schubert, vicprezidanto; Walter Hensche, kasisto, kaj Elisabeth Rittersbach, sekretariino. Kasrevizoroj restis W ilhelm Barnickel kaj Florin Caragea.

El la raportoj kaj planoj ripete montriĝis la problemoj kaj taskoj, kie kaj kiel ni povas prezenti nian lingvon ekster niaj propraj vicoj al la publiko. Porta aplaŭdo akompanis la honorigon de malnovaj aktivuloj pro multjara agado en GEA: Heinrich Harasin (50 jaroj) kaj lia edzino (25 jaroj).

Kadra programo de la kunveno estis ilustrita prezento de la rakonto "La Eta Princo" (s-ino Ritterspach), kaj pri ekskursoj tra Islando okazis de la UK ges-roj Hirsch montris filmon kaj diapozitivojn. La PILO-librostando, kiun f-ino Hoffmann alportis el Nürnberg, estis bone frekventita.

Fervojistaj terminaristoj diskutadis

Arnhem (pp-ritt) - Starigi fakterminaron en internacia kunlaboro per nura korespondado estas treege malfacila tasko. Tion spertadis la fervojistaj terminaristoj kaj ili ankaŭ konscias, ke unu aŭ du dumkongresaj kunsidoj ne povas sufiĉe rapidigi la progreson de la laboro. Tial oni interkonsentis, ke okazu almenaŭ unu interkongresa renkontiĝo.

Ĉi-foje Bennekom en Nederlando, proksime de Arnhem, estis la elektita loko, kien invitis Cor Broekman kaj Wim van Leeuwen por la semajnfino 19/20 nov. 1977. Venis terminaristoj el Belgio, Francio, Germanio, Finnlando kaj Nederlando, entute dekunu viroj kun naŭ edzinoj. Dum la viroj ŝvite diskutadis, la virinoj zorgis por kafo kaj kuko inter la komunaj manĝoj en la Naturamika Domo, aŭ ili babilis, ĉar ekstere senĉese pluvalidis. Sub tiaj idealaj laborokondiĉoj oni sukcesis eldiskuti pli ol 40 dubajn terminojn.....

La semajna komentario el Aŭstrio

La 3-an kaj 4-an de decembro 1977 la Esperanto-Redakcio de ORF disaŭdis jenan semajnan komenton de d-ro Alfred Macher:

"En la aŭstria parlamento aktualas nun la buĝet-debato. Tiu iam tre sovaĝa, preskaŭ bataleca speco de debato fariĝis trankvila klarigo flanke de la registaro pri ties politiko, al kiu la opozicio, kun nur malmulta emocio, respondas per la kutima riproĉo, ke la registaro en preskaŭ ĉiu rilato nur fuŝadis, precipe per tro pezaj impostoj kaj pro fatala enŝuldo de la ŝtato.

Kvankam substrekante, ke lia registaro sukcesis konservi la plenokupitecon kaj redukti la inflacion, la kanceliero avertis kontraŭ nesufiĉe singarda optimismo en la taksado de niaj ekonomiaj ŝanĉoj.

Multe pli emociite la parlamento debatis pri la terorismo, kiu evidente transiras de sia germania ĉefsceno nun ankaŭ al Aŭstrio. Ĉar en la kazo de la sensacie forkaptita, nur per altega monsumo reaĉetita industriisto Palmers, nia polico malkovris, ke temas pri krimo de tri germanaj teroristinoj, kiujn helpis, subulmaniere, kelkaj - simpatiantaj kun ili - aŭstraj studentoj.

Aŭstrio intencas rebati tiun terorismon energie, kaj ni esperas, ke ankaŭ Italio, Francio, Greklando kaj aliaj baldaŭ elpaŝos celtaŭge por izoli ĝin kaj - kio estus eĉ pli grave - konvinki la simpatiantojn, ke la terorismo ne estas io politike iel pravigebla, sed nura, pura krimo!"

En propra afero

Pilo-Press bedaŭras la malfruigon de ĉi tiu numero. Malsaniĝo de la eldonanto kaŭzis ĝin. Sed ekde nun Pilo-Press kaj la aliaj Pilo-eldonaĵoj denove regule aperas.

Mallongaj informoj

Otto Gessner, studento de universitato de Würzburg, estis elektita prezidanto de la Esperanto-grupo Würzburg dum la jarĉefkunveno la 5-an de decembro. La restaj funkcioj restis en malnovaj manoj. Kiel unu el siaj ĉefaj taskoj Otto Gessner konsideras la gajnon de junaj homoj por la grupo Würzburg.

Jomo Ipfelkofer, Augsburg, montris lumbildojn la 3-an de decembro pri sia vojaĝo dumsomera al Kubo antaŭ la Augsburga grupo.

Citaĵoj

Koran dankon pro Pilo-Press n-roj 43,44, ambaŭ riĉaj de tre interesaj informoj. Per ĉi tiuj mi sukcesis identigi kelkajn subskribojn en iu bildkarto, kiun mi ricevis de d-ro Kondor, oazke de la premiero de Sommerhausen. Apartajn dankojn pro mencio de V.R. ĉe ambaŭ numeroj. 20.XI.77/2286 por la V.R. J.

Dankon pro PP, n-ro 45, kiu havas interesan enhavon. El ĝi ni sciis pri la adreso de Nischwitz kaj volonte ni gratulas lin pro lia longdaŭra aktiveco pri E. Aparte interesa estis artikolo pri filatelio, de d-ro De Salvo. Ni ĝojas ankaŭ trovante mencion de diversaj niaj konatoj, kiu, do, ŝatas, kiel ni vian bultenon. 28.XI.77/2321 por la R.V. J.

El leteroj al d-ro J. Kondor

Kiam mi legis Viajn rememorojn pri via restado en Pollando, mi ankoraŭ foje travivis tiujn neforgeseblajn momentojn. Tre kortuŝigis min Viaj impresoj. Mi ne nur mem legis, sed ankaŭ mi tradukis Viajn rememorojn al miaj gepatroj. Sed kredu al mi, en tiuj ĉi momentoj, kiam vi pri-skribis la grandan amon al nia Dipatrino, la Perpiedan Varsovian Pilgrimon kaj citis la vortojn de H. Frank, mia voĉo rompiĝadis pro la kortuŝo, kaj la larmoj aperis en la okuloj.

B. S.

Aliaj Pilo-Limerikoj

Promenas bervalo ĉe Nilo.

Rigardas sen mir' krokodilo.

La bervalo salutas,

Krokodilo ne mutas:

Mi legas bultenon de Pilo.

Aŭskultas radiinde Romo

Nigrul' en afrika terdomo.

Esperanton li regas,

La antenon li flegas.

Ĝi tamen aspektas fantomo!

Gemma Pirlot el Oostende: Mi raportas pri via elsendo de 2.10.77, sed nur pri la lastaj 5 minutoj, ĉar pli frue mi aŭskultis la Vatikanan Radion: ja, mi ne povas sekvi du programojn samtempe! La intenseco de la radiosignalo estis tre forta, sed bedaŭrinde estis multaj interferoj. P. Maybin el Romford, Britujo: Per mia radioaparato kun etendiĝanta anteno la 2-an de oktobro mi kun plezuro aŭdis vian programon. Estis bona intenseco dum la unua duono, sed dum la "Leterkesto" post la muziko okazis multe da interferoj de aliaj stacioj. Mi sufiĉe bone komprenis la elsend-enhavon.

El du leteroj al Radio Roma